




# Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2019 (216) 15. 10. 2019

## La praga klubo rememorigas sian grandan estron



1901 *Jaroslav Šustr* 1969

La 8-an de septembro 2019 pasis 50 jaroj ekde la morto de Jaroslav Šustr, elstara esperantisto, multjara prezidanto de nia klubo (1931–1958) kaj ĝia honora prezidanto, honora membro de ĈEA, delegito kaj ĉefdelegito de UEA, „karmemora homo“. La klubo rememorigis lin per solena prelego, kiu okazis la 3-an de oktobro 2019 kaj eldonas tiun ĉi numeron de Bulteno, kiu estas komplete dediĉita al li.

### EL LA ENHAVO

La vivo de Jaroslav Šustr .....	2
Šustr en rememoroj .....	9
Šustr en dokumentoj .....	12
Šustr en poemoj .....	15
Nigra elefanto .....	16

Ĉíslo vĕnované našemu neĵslavnĕjšímú pĕdsedovi Jaroslavu Šustruvi (1901–1969), který byl hybnou silou pražských esperantistů po několik desetiletí.

### O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980  
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze  
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7  
Vychází třikrát ročně  
Kontakt: [t.brichacek@seznam.cz](mailto:t.brichacek@seznam.cz)  
Redaktor: Tomáš Břicháček  
Korektury: P. Petřík, M. Turková,  
J. Košťálek, P. Chrdle

# La vivo de Jaroslav Šustr

Tomáš Břicháček

Jaroslav Šustr naskiĝis la 6-an de decembro 1901. Kie precize ne estas konate – pluraj fontoj parolas pri Prago, dum laŭ Jaroslav Mařík tio estis en Ústí nad Orlicí.<sup>1</sup>

Pri liaj infaneco kaj adolesko, kiuj pasis parte en la esperplena epoko de la komenco de la 20-a jarcento, parte en la mizeraj jaroj de la unua mondmilito, ni preskaŭ nenion scias. Unu certa punkto – por ni tre grava – estas, ke en la jaro 1917 kiel deksejara li iĝis esperantisto. Ni ankaŭ scias, ke iam dum la milito li estis metilernanto en iu delikataĵejo.

## *Juna aktivulo*

Lia aktiva engaĝiĝo en la movado datiĝas je la komenco de la dudekaj jaroj. Ekde la jaro 1920 li estis landa peranto de la revuo Heroldo de Esperanto.<sup>2</sup> En 1921 li jam estas menciita kiel Esperanta funkciulo – laŭ iuj fontoj de la nova Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (ĈAE), laŭ aliaj de la praga esperantista klubo.

Multaj gravaj eventoj okazis en nia ĉefurbo en tiu epoko. Unue tio estis en februaro 1920 la fondiĝo de ĈAE en la kafejo Louvre. En la somero 1921 Prago gastigis la 13-an Universalan kongreson kun 2561 partoprenantoj el 35 landoj. En junio 1923 oni fondis Ĉeĥoslovakon Esperanto-Instituton kun la celo prilabori la instruon kaj prelegan flankojn de la propagando. Ekaperis novaj gazetoj, Esperanto eksonis en radio ktp.

Ni povas supozi, ke la juna Šustr partoprenis iujn de tiuj epohaj aferoj kaj ke ili fortigis lian entuziasmon por Esperanto. Precipe ni povas juĝi, ke li iĝis aktiva membro de la praga klubo.

Tiam la klubon gvidis la fama Josef Eiselt (1918–1924) kaj poste Konstantin Koutek (1924–1926). El la aliaj ĉefaj esperantistoj agantaj en Prago en tiuj jaroj oni povas nomi Rudolf Hromada, Julie Šupichová, Augustin Pitlík kaj Oldřich Adámek.

Šustr plej verŝajne jam en tiuj jaroj montris sian diligentecon, komunikan lertecon kaj organizan talenton. Ĉiukaze en la jaro 1927 li estis elektita vicprezidanto de la klubo. La nova prezidanto (post K. Koutek) iĝis tiam Rudolf Hromada.

Ĉestmír Vidman poste skribis, ke organizaj aferoj ŝajne ne estis ŝatata agadkampo de Hromada kaj ke li preferis laboron kun la lingvo, en kio li iĝis granda fakulo.<sup>3</sup> Li do eble plenvolonte utiligis kapablojn de sia

<sup>1</sup> Mařík J.: *Honoraj membroj de ĈEA*, Starto 4/1991 [1991].

<sup>2</sup> Origina nomo en 1920–1925 estis *Esperanto Triumfonta*.

<sup>3</sup> *Čestmír Vidman vzpomíná Rudolfa Hromadu*, <http://v-art.cz>.

vicprezidanto, kiu tiel komencis praktike gvidi la klubon jam en tiuj jaroj (1927–1931). Tiun hipotezon subtenas la fakto, ke iuj fontoj mencias Ŝustr-on kiel prezidanton jam ekde la jaro 1927.

Koncerne la privatan kaj laboran vivon de Ŝustr en tiu epoko, ni povas supozi unue, ke li edziĝis (postaj fontoj mencias lian edzinon aŭ familion). Due, ni povas diveni, ke en tiuj jaroj li estis dungita kiel komerca helpanto en iu praga vendejo kaj songiĝis pri sia propra entrepreno.

### ***Juna estro kaj komercisto en la tridekaj jaroj***

La 23-an de januaro 1931 Jaroslav Ŝustr estis elektita prezidanto de la praga klubo kaj tiel komenciĝis lia longa estra erao, kiu daŭris preskaŭ 28 jarojn. Tiu funkcio estis ekde tiam la gravcentro de lia Esperanta agado, kvankam li ankaŭ plenumis diversajn rolojn en ĉeĥoslovakaj naciaj organizaĵoj (ĈAE, EAĈSR) – ekzemple inter la jaroj 1932 kaj 1933 li estis ĝenerala sekretario de ĈAE – kaj ekde 1931 li estis delegito de Universala Esperanto-Asocio.



(1937)      Otto Ginz      J.R. Scherer      Jaroslav Ŝustr

Laŭ ĉiuj fontoj li estis ekzempla gvidanto de la klubo. Li pri-zorgis riĉan programon de la semajnaj klubaj kunvenoj, kiuj estis dediĉitaj al allogaj kaj instruaj temoj. Li estis tre afabla kaj helpema rilate al ĉiuj klubanoj, esperantistoj kaj homoj ĝenerale.

Laŭ la revuo *Esperantista* la klubo antaŭ la dua mondmilito „fariĝis speco de internacia esperantista salono. Da vizitoj de fremdlandanaj esperantistoj en ĝiaj kunvenoj dum kelkaj jaroj estis ne dekoj sed centoj“.<sup>4</sup>

La revuo *Ligilo* en la jaro 1937 laŭdis Ŝustr-on pro lia agado por ĈAE, ĉar li „sukcese aranĝis paroladvojaĝojn de eksterlandanoj kaj vigle kaj lerte partoprenis multajn E-aranĝojn.“ Ĝi aldonis: „Tamen lia ĉefa larborkampo estas la E-klubo en Prago, [...] kie li per sia bona humoro sukcesas vigligi

<sup>4</sup> Revuo *Esperantista*, n-ro 12/1951 [1951].

la kunvenojn. Li zorgas ĉiam pri programo kaj interesa enhavo de la kunvenoj. Li nur plendas, ke la Asocio forprenas de la kluba laboro liajn plej kapablajn kunlaborantojn. Sed li povas esti fiera, ke la klubo liveras al la ŝtata organizaĵo multajn funkciulojn.“<sup>5</sup>

Granda amo de Ŝustr estis la kluba biblioteko, kiun li daŭre ampleksigis. Li senlace havigadis al la klubo eksterlandan literaturon kaj gazetojn.<sup>6</sup> Antaŭ la milito la biblioteko jam havis proksimume 1800 volumojn. Iom post iom ĝi kreskis. En la jaro 1969, kiam Ŝustr aldonis siajn proprajn librojn, ĝi jam konsistis el proksimume 4700 volumoj. (Poste la kluba estraro atribuis al la libraro honoran titolon *Biblioteko Jaroslav Ŝustr.*)



Iam en la tridekaj jaroj Ŝustr malfermis en la praga Dlouhá třída (Longa avenuo) vendejon de bongustaĵoj. Poste, eble jam dum la okupacio tiu vendejo translokiĝis al la najbara Benediktská strato, kie Ŝustr lasis desegni sur fasado (de la domo n-ro. 9) grandan reklamon. Ĝi rimarkinde restis tie ĝis nunaj tempoj.

La revuo *Esperantista* skribis poste pri la butiko, ke ĝi „estis dum longa vico de jaroj kvazaŭ centra kunvenejo de esperantistoj el la ĉefurbo, el la provinco kaj el la fremdlando. Ĉiu veninto ricevis afablan informon; ofte ĝi signifis kuraĝigon; iam eĉ helpon materian al vojaĝanta samideano en

embaraso. Ankaŭ tie, ne sole en la klubejo kaj en kluba administro, helpadis al li lia edzino, kiun ĉiuj esperantistoj konas kaj alte estimas“.<sup>7</sup>

En tiuj jaroj Ŝustr verŝajne jam loĝis en ludomo en Dlouhá třída n-ro. 10, kiun mencias postaj dokumentoj, kaj kie li restis ĝis la fino de sia vivo.

### ***Jaro 1938***

El la fino de la jaro 1938 konserviĝis protokolo, en kiu Ŝustr propramane notis ĉefajn eventojn de la pasintaj dramaj monatoj. Li priskribis en ĝi la kuron de la kunveno de la 23-a de septembro, do de la tago, kiam estis

<sup>5</sup> Revuo Ligilo [1937].

<sup>6</sup> Mařík J.: *Honoraj membroj de ĈEA*, Starto 4/1991 [1991].

<sup>7</sup> Revuo Esperantista, n-ro 12/1951 [1951].

proklamita mobilizo. Li kritikis munkenan perfidon. Fine, li resumis sekvantajn okazintaĵojn.

La tutan tekston ni citas en la Bulteno n-ro. 2/2014. Ĉi tie ni nur rememorigu la finan parton, kiu koncernas klubajn aferojn post Munkeno:

„Nia klubo ĝis la fino de la jaro (1938) kunvenis neoficiale, ĉar daŭris polica malpermeso pri kunvenado. Niaj membroj militservis diverslonge. Mi, kiel 37-jaraĝa revenis post ne tutaj tri semajnoj. Sed kelkaj malpli aĝaj militservis ĝis la jarfino.

La kunvenetoj okazintaj dum nia neĉeesto (la 30/9 kaj 7/10 1938) estis tre malmulte vizititaj. La unuan vizitis ĉirkaŭ kvin, la duan proksimume dek membroj, laŭ la rakontado de kunvenintoj.“

### ***Okupacio, milito***

Venis la germana okupacio kaj la dua mondmilito. Dum tiuj malfacilaj tempoj Ŝustr provis grandan sindonemon kaj kuraĝon. Li strebis ĉiurimede daŭrigi la Esperantan vivon en nia ĉefurbo kaj li savis la kluban bibliotekon. Bulteno poste skribis: „Animo de grupo de esperantistaj fideluloj li restis dum la tuta milito.“<sup>8</sup>

Laŭ la revuo *Esperantista* estis danke al Ŝustr, ke la klubo ne ĉesis funkcii en tiu epoko. „Eĉ dum tiuj mallumaj jaroj flagris flameto de esperantista fido al homa intelekto kaj pensokapablo. Estas ankaŭ precipe lia merito, ke la Kluba biblioteko estis konservita. Li ja sciis ofereme transportigi ĝin en kelon, kiam la klubejo estis nuligita ĉe adapto de la kafejo Louvre al komercaj oficejoj, kaj fine transportigi ĝin en ĉambron de la Asocia oficejo.“<sup>9</sup>

Jiří Patera en sia kroniko skribas: „Pro la germana subpremado iom malaperis la publika agado de la klubo, la kunvenoj ĉesis kaj nure en la kafejo kunvenadis malgranda areto da esperantistoj kun la prezidanto, malofte dek, iam sole du-tri homoj.

Tamen la gestapo venis en la fino de la jaro 1943 spionadi, ĉu esperantistoj kunvenas kaj kun akuzo al la prezidanto, kial la klubo ne likvidiĝis, kiam ja Esperanto estas malpermesita. Tiam prezidanto Ŝustr anoncis al la polico likvidiĝon de la klubo la 20-an de februaro 1944 kaj prezentis al la gestapo nomaron de biblioteko kaj konfirmon, ke la mona havaĵo de la klubo estis laŭ la statuto sendita al Ústřední matice školská (Centra Lerneja Ofico). La nomaro de la biblioteko estis nekompleta, la plej gravaj libroj estis donitaj al kelkaj klubanoj por konservi ilin. La kunvenoj de la fidela areto ne ĉesis. La gestapo trankviliĝis kaj ne plu malkvietigis la lastajn fidelulojn.

---

<sup>8</sup> Bulteno de EKP, n-ro 33/1956 [1956].

<sup>9</sup> Revuo *Esperantista*, n-ro 12/1951 [1951].

Apartan dankon meritas s-ano Ŝustr, kiu pro persona saĝo kaj kuraĝo ebligis konservon de la klubaj havaĵo kaj tradicio.”<sup>10</sup>

Jaroslav Mařík rememoras: „Dum la nazia okupacio kelkaj fidelaj membroj, precipe Ŝustr, kunvenadis vespere, dum la estinta kutima kunven-tago, en nia iama ‚hejmo‘, la kafejo Louvre (Národní tř.), inter la aliaj gastoj, nur por interŝanĝi novaĵojn ktp. Post tempo la kelnero avizis nin, ke pasintfoje serĉis nin tie la gestapo kaj enketis la kelneron pri esperantistoj. Tiu rediris, ke nenioj kunvenadas en ilia kafejo. (Mi memoras inteligentan junulon nekonatan, kiu komencis venadi inter nin, kun aserto interesiĝi pri Esp-o. – Mi rekonis lin post jardekoj, kiam okazis (dum la komunisma reĝimo) ia studenta protesta kunveno apud la Mácha-statuo. Ĉu hazardo, aŭ ne – ĝi ja estis sub Petřín? Li aspektis kvazaŭ ruino...).“<sup>11</sup>

### *Nilona epoko*

Post la fino de la milito ekestis mallonga periodo de malstreĉo, kiu iam ne nur en muzika kunteksto estas nomata *nilona epoko*. En tiu libera etoso reviviĝis ankaŭ la ĉeĥoslovaka Esperanta movado kaj kun ĝi la praga klubo.

Jiří Patera en sia kroniko parolas pri multaj eventoj, kiuj okazis en tiuj jaroj. Temas pri kunvenoj, prelegoj, festoj, radioelsendado, kursoj, junulara rondeto ktp.

Ekzemple la 20-an de junio 1945 okazis la unua kluba kunveno post la milito kaj de post tiam kunvenoj okazis ĉiun merkredon en la tradicia klubejo en la kafejo Louvre. (Ankoraŭ en la jaro 1945 estis 30 kunvenoj, kiujn vizitis sume 1126 membroj, 111 gastoj, 29 eksterlandanoj.)

La 16-an de januaro 1946 oni organizis la unuan postmilitan jarkunvenon de la klubo, kiun ĉeestis 73 personoj. La klubo havis je tiu dato 360 membrojn, el ili 180 el Prago kaj 180 ekster Prago. Ŝustr estis denove (kiel multfoje) elektita prezidanto.

Pri la jaro 1947 Patera skribas, ke la klubo „kunvenas regule ĉiun merkredon je la 20-a horo en kafejo Louvre [...]. La programoj de la kunvenoj estas por ĉiu monato antaŭe fiksitaj kaj havas ĝenerale altan nivelon“.

Do, la tempo ŝajnis bonpromesa. Bedaŭrinde baldaŭ montriĝis, ke tio estis nur momento de ripozo antaŭ alia despotismo kaj aliaj komplikaĵoj.

---

<sup>10</sup> Patera J.: *Kroniko de Esperanto en Praha*, <http://www.cs-retromusic.net>.

<sup>11</sup> Mařík, J.: *90 jaroj de Esperantista klubo en Praha (fina parto)*, Bulteno de Esperantista Klubo en Prago kaj de Esperantista Klubo en Brno, n-ro 2/1993 [1993].

### ***Komunisma puĉo, kvindekaj jaroj***

La komunisma puĉo en februaro 1948 intervenis negative kaj en la personan vivon de Ŝustr kaj en la agadon de la praga klubo.

La butikoj de Ŝustr estis ŝtatigita. Li almenaŭ povis resti tie kiel ĉefo. Anstataŭ entreprenisto li do iĝis ŝtata dungito.

La klubo ne estis malpermesita, sed ĝi devis alfronti diversajn malfacilaĵojn.

Jiří Patera parolas unue pri problemoj kun kunvenejo – en la jaro 1949 la klubo kelkfoje translokiĝis kaj la agado pro tio iom malvigliĝis; kunvenoj okazis en sep diversaj lokoj en Prago.

Poste estis necese trovi iun kadron inter socialismaj organizaĵoj. La praga klubo do en la jaro 1951 aliĝis al la Kleriga societo de Prago 2 (Osvětová beseda Praha 2). Sed samtempe ĝi perdis sian kunvenejon kaj lokon por sia libraro. Ŝustr tiam prenis la librojn ĉe li hejmen kaj serĉis novan ejon por ĝi.

En la jaro 1952 la reĝimo ordonis likvidon de la nacia organizaĵo Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka respubliko. Restis nur lokaj esperantistaj kluboj. Ŝustr kun aliaj aktivuloj de tuta lando en venontaj jaroj strebis kompensi ĉi tiun mankon.

Jaroslav Mařík skribis pri tiu epoko: „Post la likvido de EAĈSR (1952) la klubo fakte parte plenumadis ĝiajn taskojn klopodante teni kontinuecon de la lokaj unuoj, per vasta korespondado (Ŝustr) kaj tutlanda dissendado de sia bonkvalita (laŭenhave) Bulteno. Tio kaj la aktivado de R. Burda en Plzeň (pere de sia internacia bulteno La Pacdefendanto) kaj same la tiama admirinda vigliĝo de la esperantista junularo (studtendaroj, jarkonferencoj k.a.) kun ‚Centrejo‘ en Opava (tiam: Kuzník, Solnický, Novobilský) malhelpis kolapson de la Movado. [...] La kluba junularo akiris en 1955 propran klubejon en la Římská-strato. La aktiveco kompreneble ne plaĉis al la Ŝtata polico, kiu komencis grave ĝeni la funkciulojn.“<sup>12</sup>

Sed ne ĉio estis tiel nigra. Inter pozitivaj aferoj menciindas la sekvantaj: Dum tutaj kvindekaj jaroj la praga klubo estis forta kaj ĝia programo riĉa. En la jaro 1953 komenciĝis aperi la praga Bulteno. La saman jaron Ŝustr ricevis diplomon de la eduk-ministerio de Gvatemalo (1953). En januaro 1956 la praga klubo festis la 25-an datrevenon de la prezidado de Ŝustr. En la Bulteno aperis laŭda artikolo. Eli Urbanová verkis poemon. Ŝustr ricevis multe da gratuloj. Fine, ekde 1956, Ŝustr estis ĉefdelegito de UEA.

Tamen la pugno de la reĝimo ankoraŭ unufoje dure frapis. En 1958 Ŝustr estis arestita kaj tri monatojn tenita en malliberejo pro supozata kulpo pri spionado. La vera kialo estis lia daŭra landskala agado por savi la nacian movadon. Li devis abdiki la klubgvidadon, kio okazis la 24-a de septembro

---

<sup>12</sup> Mařík, J: cit. *90 jaroj de Esperantista klubo en Praha (fina parto)*.

1958. (Nova prezidanto iĝis Jaroslav Mařík.) Fine la kulpo ne estis pruvita kaj la tribunalo malkondamnis lin, sed li jam ne revenis al la ofico.<sup>13</sup>

### *Lastaj jaroj*

La lasta epoko de la vivo de Ŝustr post lia abdiko estis ĉiam plena de laboro por Esperanto kaj por la praga klubo. Li restis en tiuj jaroj ĉefdelegito de UEA kaj nia aktiva membro.

Estis verŝajne ankaŭ lia merito, ke la klubo akiris novan lokon por sia biblioteko. Temis pri la domo ĉe Nigra Elefanto en strato Týnská n-ro 3 en Malnova Urbo, proksime de la loĝejo de Ŝustr. La 30-an de aprilo 1960 la kluba komitato solene malfermis la novan ejon. La kroniko de Jiří Patera aldonas, ke „[s]-ino Brotánková deĵoris en la biblioteko ĉiuvendrede de la 16-a ĝis la 18-a horo. Dum tiuj horoj klubanoj povis pruntepreni librojn.“

Ŝustr tiam skribis por la Bulteno serion de artikoloj „Nigra elefanto“, kiuj temas pri la domo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La preskaŭ kompleta serio estas represita en tiu ĉi Bulteno.

La 14-an de februaro 1964 la komitato de la Esperantista klubo en Prago nomis Ŝustr-on honora prezidanto de la klubo „pro grandaj meritoj kaj longjara senlaca laboro por la klubo, kiu dank’ al lia multflanka, ĉiam entuziasma aktiveco, akiris internacian reputacion“.

En la jaro 1965 Ŝustr ricevis diplomon de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato.

Pri la senhalta laboremo de Ŝustr en tiuj jaroj atestas rememoro de Jaroslav Mařík, laŭ kiu la honora prezidanto en la jaro 1967 forsendis 8 035 klubajn poŝtaĵojn. Al Ŝustr ili venadis en poŝta sako. Ĉefe li plenumadis petojn el eksterlando.<sup>14</sup>

En marto 1969 Ŝustr ankoraŭ partoprenis la konstituan kongreson de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Brno, kie li ankaŭ estis proklamita honora membro de la nova organizaĵo.

Konserviĝis el tiu tempo unu citaĵo, kiun li adresis al la asocio: „Ĉion, kion mi faris kaj faras, mi konsideras mia devo, kiun cetere plenumus ĉiu el vi.“<sup>15</sup>

Dum la kongreso Ŝustr jam estis grave malsana. Laŭ unu memorulo: „Li lamis pro iskiatikaj doloroj kurbigantaj lian lumbon, sed spirite li estis laŭkutime vigla, tre afabla kaj sprita.“ Poste dum la jaro lia sanstato ege malpliboniĝis.<sup>16</sup>

Li mortis en Prago la 8-an de septembro 1969 en la aĝo de neplenaj 68 jaroj. Li estis sepultita en Ústí nad Orlicí.

<sup>13</sup> Mařík, J: cit. *90 jaroj de Esperantista klubo en Praha (fina parto)*.

<sup>14</sup> Mařík, J: cit. *90 jaroj de Esperantista klubo en Praha (fina parto)*.

<sup>15</sup> Revuo Esperantisto, oktobro 1969 [1969].

<sup>16</sup> Revuo Esperantisto Slovaka, n-ro 6/1969 [1969].



## **Eli Urbanová:**

„Sed jam ekrimarkis nin Ŝustr, la prezidanto de la klubo. La longulo. Li klinas sin al ni desur sia alto. – Bonvenon, sinjoro profesoro... Sur mian manon li ekpemis laŭdevan kison. Ŝustr estas atentema al ĉiu. Ne ekzistas tiu, kiun li preterrigardus kaj neglektus. Vi diros – li estas komercisto, li havas tion ensange. Sed ĉe Ŝustr tio ne estas nura rutino. Lia rilato al la homoj estas vera. Kaj la homoj kredas al li. La pragan klubon li gvidos 28 jarojn. Li plenumas kompreneble ankaŭ aliajn funkciojn. Unu tre pretendan: Li estas ĉefa delegito de la Universala Esperanto-Asocio. La korespondaĵojn oni al Ŝustr liveras en poŝtakoĵ. Preskaŭ sep kilogramojn pezas leteroj, kiuj amasiĝas sur lia skribotablo kaj kiujn necesas respondi. Ne, mi ne intencas ĉi tie paroli pri liaj modele plenumataj taskoj. Pri la ordenoj, kiujn oni al li donis pro liaj eksterordinaraj meritoj. Mi volas menciĝi sole pri tio, ke li konstruis la Esperantan bibliotekon kaj ke li trifoje savis ĝian sorton. La unuan fojon dum la germana okupacio, la duan fojon, kiam la klubo perdis la ejon kaj trian fojon en la jaro 1952 post la dumtempa likvido de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Imagu, ke vi devus hejme deponi du milojn da libroj. Ne ĝis morgaŭ, sed por nedefinite. Verŝajne vi ne estus tro entuziasmaj. Ŝustr ne hezitis kaj konservis ilin en sia loĝejo. Kaj kiel pasis la tempo, li aldonis al ili ankoraŭ tri milojn da volumoj, kromalie el Ĉinio, Vietnamio, Laoso kaj Japanio. Hodiaŭ estas ‚la biblioteko de Jaroslav Ŝustr‘ la plej valora posedaĵo de la Praga Esperanta Klubo kaj viciĝas al la plej grandaj de tiu speco en la mondo.“

(1995, el la romano *Hetajro dancas*)

## **Josef Trojan:**

„Mi venis en Pragon iam en la dua duono de la 50-aj jaroj por studi en altlernejo. Mi studis la fakon *inĝenieraj konstruoj* en la Ĉeĥa Alta Tehnika Lernejo. Poste mi jam restis en Prago kaj edziĝis ĉi tie.

Jam dum miaj studoj mi komencis viziti la pragan esperantistan klubon. Tiam la prezidanto estis la legenda Jaroslav Ŝustr. Li estis tre simpatia, afabla homo, kiu strebis helpi al aliaj.“

(2014)


## **Stanislav Kamaryt:**

„[D]u trajtoj en lia karaktero estas la plej elstaraj: aktiveco kaj studemo. Tiaj kvalitoj daŭre instigas al akcepto de taskoj, iam ne tro facilaj kaj ĉiam lacigaj. Sed la dua flanko de laceco estas ĝojo pro farita servo.“

(1956)

***Oldřich Kníchal:***

„Kiam mi [...] venis por studi en Pragon, samideano Ŝustr estis verŝajne la unua homo, almenaŭ el inter la esperantistoj, kun kiu mi kontaktiĝis. En lia biblioteko – tiam ankoraŭ en la Dlouhá strato – mi trovis ĉion, kion nova adepto de Esperanto povis bezoni. Dum sabataj posttagmezoj okazadis tie miaj ravaj rendevuoj kun la literaturo kaj historio de la internacia lingvo. La posedanto lasis min foliumi en la libraro kaj mi danke reciprokis per okaza helpo, restante daŭra leganto. Afabla bibliotekisto imponis al mi per siaj barorompaj energio kaj obstino, plaĉis al mi lia bela kaj modela elparolo Esperanta. Kaj li havis manplenen da kompreno por ĉiu. Krome, li estis la plej entuziasma laboristo de nia movado, kiun ni iam konis... Unu detalo eble karakterizas ankaŭ lian sintenon al homoj, kiuj forpasinte, postlasas al ni ardan mesaĝon de sia koro; ĉe tiaj okazoj li kutimis uzi la vorton ‚karmemora‘. Nome tiun vorton mi ŝatus rememori, kiam li ne plu estas inter ni.“



(1969)

***Ivo Lapenna:***

„La nomo de Jaroslav Ŝustr restos en daŭra rememoro de ĉiuj, kiuj havis la okazon lin koni, kaj sendube estos ĉiam apreziata pro la granda kaj sindona laboro, kiun li faris por progresigi la Internacian Lingvon.“

(1969)

***Nekonata redaktoro de la revuo Esperantisto Slovaka***

„Mi regule vizitadis lin en Prago aŭ en la vendejo, kies gvidanto li estis, aŭ en lia hejmo, ĉar nin ligis ne nur lia funkcio, sed ankaŭ la sincera, frata amikeco, per kiu li min ĉiam traktis ne nur persone, sed ankaŭ skribe, okaze de prizorgado de libroj, gazetoj, membreco en UEA, organizaj aferoj, ja eĉ kontribuaĵoj por ‚Informoj‘. Li estis preciza, zorgema, fidinda laboranto kaj kunbatalanto sur la kampo de nia movado, al kiu li oferis ĉiujn siajn liberan tempon, kapablon kaj fortojn.“

(1969)

***Jaroslav Mařík***

„Persono preskaŭ ne konanta libertempon, dediĉanta sin al formika ĉiutaga laboro por la Movado [...].“

(1991)

### *Esperantista klubo ĉe Parko de kulturo kaj ripozo en Brno:*

„S-ano J. Ŝustr estis unu el la plej gravaj kaj laboremaj homoj en la movado. Dum pluraj jardekoj li plenumis kun ekstrema oferemo kaj saĝo gravajn funkciojn. [...] Lia aktiveco, laboremo, energio estis admirindaj kaj ekstreme granda lia helpemo kaj modesteco.“

(1969)




Fotoj el la solena prelego okazinta la 3-an de oktobro 2019 (Vlasta Piščíková, Jiří Mišurec)

## **Kio okazis kun la biblioteko de Jaroslav Ŝustr?**

La *Biblioteko Jaroslav Ŝustr* estas nur parto de la Esperanto-kolekto de la Urba Muzeo en Česká Třebová. Ĝi konsistas el proksimume 6 mil volumoj.

La Vikipedio diras pri tio la sekvantan: „En 1994 la Esperanto-klubo en Prago perdis sian ĉambron (novaj posedantoj de domo nuligis la luon) kaj ekestis problemo, kion fari kun la plej valora ĉeĥa biblioteko de esperantaĵoj. Tiam samideano Jiří Pištora, tiama direktoro de Urba Muzeo en Česká Třebová, proponis ĉambron en la muzea deponejo kaj promesis profesion prilaboron de la kolekto. Ankaŭ la urbo Česká Třebová konsentis kaj estis subskribita kontrakto inter Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj la muzeo, ke la libroj apartenas al la asocio (do en la kazo de nuligo de la Esperanto-fako en la muzeo ili estos redonitaj). Tiel estiĝis la Esperanto-fako en la muzeo, kiu ne nur prilaboris librojn kaj gazetojn, sed kolektas ankaŭ aliajn esperantaĵojn, leterojn de gravaj esperantistoj, klubajn informilojn kaj informilojn, simple ĉion, kio povas post jardekoj interesi estontajn historiistojn.“

# Ŝustr en dokumentoj



## Nia Jaroslav Ŝustr 25 jarojn prezidas la klubon!

Certe unu el la plej konataj nomoj en Esperantujo estas tiu de UEA-delegito, longjara ĉefdelegito Jaroslav Ŝustr el Prago. Estas li, kiu en pli fruaj tempoj estis motoro de tiel vigla movado en nia ĉefurbo kaj estas li, kiu ankaŭ dum la tempo pli posta montris sian grandan energion, kiam aliaj timis ion ajn fari por la movado. Dum la ŝtata mallibero li gardis tutan Kluban havaĵon, la plej grandan mezeŭropan Esperanto-bibliotekon de nia Klubo kaj ne unufoje li havis gestapon en sia hejmo. Animo de grupo de esperantistaj fideluloj li restis dum la tuta milito. Kaj post tiuj kruelaj jaroj kun nova energio, ĉiam ridema kaj bonhumora, afabla kaj bonkora li denove staras kiel la unua de la Klubo. Denove al eksterlandaj gastoj, karavanoj li kun helpo de ceteraj klubanoj montras la konatan ĉeĥoslovakian gastamon, plenumas siajn taskojn de la delegito, prelegas, informas, vizitas landajn kongresojn, konferencojn aŭ najbarajn esperantistojn, zorgas pri aferoj, kiujn ne povas plenumi neekzistanta Asocio.

Ankaŭ por sia familio li havas sian tempon, kvankam lia okupo estas nervostreĉa kaj temporaba. Ankaŭ en tiu rilato li estu ekzemplo por ni!

Por la movado de post sia junaĝo li dediĉas ĉiujn siajn eblecojn kaj tempon kaj dum jardekoj en la Klubo nur tre malmultajn vesperojn lia loko ne estis okupita. Ni, kiuj konas lin, kiuj scias pri lia laboremo, ni nur povas admiri liajn energion, viglon kaj sindonon al nia afero. Vere, ekzemplo neimitebla!

La 23-an de januaro 1956 li festas raran jubileon, kiun nur malmultaj povas festi. Al tiu ĉi jubileo ni esprimas sincerajn vortojn: Li restu longe sana por sia familio kaj ankaŭ por ni ĉiuj, li gvidu nin ankaŭ dum longaj jaroj nun, kiam la suno de proksimiĝanta favoro komencas etendi siajn unuajn varmigajn radiojn!

... Kaj nin ne timigas la netaj fantomoj,  
nek batoj de l' sorto, ne mokoĵ de l' homoj,  
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita ĝi estas,  
la voj' elektita...


*Bulteno de EKP, n-ro 33/1956*

### **Jaroslav Šustr dankas!**

Okaze de la 25-a datreveno de nia prezidantiĝo mi ricevis tiom da bondeziroj, esprimoj de simpatioj, eĉ donacoj, ke mi estis ne nur embarasita, sed ankaŭ tre kortuŝita. Dankon al vi ĉiuj, karaj gesamideanoj! Dankon al ĉiuj konatuloj! Apartan dankon al la nekonataj bondezirantoj! Akceptu mian sinceran dankon per ĉi tiu vojo! Amaso da esperantistaj laboroj malhelpas min respondi al ĉiu aparte! – Ni ĉiuj tion vidas, ni ĉiuj tion sentas, ni ĉiuj tion spertas, ke esperanta afero eniris novan epokon! Malfermiĝas novaj eblecoj, novaj perspektivoj, aperas novaj sukcesoj. La mondo ĉiam pli serioze rigardas nian movadon. Des pli diligentaj, laboremaj kaj fidelaj ni devas esti hodiaŭ. La laboro de niaj oferemaj antaŭuloj kaj la laboro nia, kiu daŭras jam jardekojn, ne estis vanaj! Sed la fina venko ankoraŭ ne estis atingita. Mi firme kredas, ke ĉiu el vi kun novaj kvantoj da entuziasmo helpos atingi ĝin! Ek al la laboro!

Jaroslav Šustr,  
prezidanto de Esp. Klubo en Praha.

*Bulteno de EKP, n-ro 34-35/1956*



## **Aby se všichni domluvili**

Halo, ĉe la telefono Ŝustr.

*Prosím Vás, mohu k Vám dnes přijít na krátký rozhovor?*

Memkopreneble. Venu! Mi estos hejme.

*Aha, že mohu přijít. Tak na shledanou!*

Ĝis la revido!

*A tak jsem tedy přišla. J. Ŝustr je jedním z našich delegátů, kteří v těchto dnech jsou účastníky 51. světového kongresu esperanta v Budapešti. Navštívila jsem ho těsně před odjezdem.*

*Jak jste se vůbec dostal k esperantu?*

O esperantu jsem slyšel poprvé z Národní politiky, kterou můj otec každý večer předčítal mamince. A tam se psalo, že je to lehce naučitelný jazyk. To mě zaujalo natolik, že jsem esperanto začal vyhledávat. V Malém čtenáři jsem objevil na pokračování vycházející kurs. Protože mi už bylo patnáct let, tajně, aby se mi známí nesmáli, jsem si Malého čtenáře předplatil. Ve dne jsem se učil v lahůdkářství, po večerech esperanto. A potom to šlo ráz na ráz. V 18 letech jsem se stal členem Klubu esperantistů, brzo na to mě zvolili do výboru a od roku 1931 jsem předsedou prakticky do dneška.

*Jak to vypadá s esperantisty u nás?*

Až do roku 1952 jsme měli svůj celostátní Svaz esperantistů. Potom se rozpadl. A tak dodnes paběrkuje po různých klubech. V Praze máme takový „hlavní“ klub a ten je ve spojení s ostatními našimi kluby i se zahraničím.

*A co mladí? Jsou členy esperantských klubů?*

Mezi mládeží začíná být o esperanto zájem. Například v našem pražském klubu je celá mládežnická skupina. Jejimi členy jsou nejvíce studenti. Také při ústředí v Rotterdamu mají mladí svou pobočku, rubriku v časopise Esperanto, nedávno skončil jejich 22. kongres v Budapešti. Právě před chvílí odtud odešli Eva a Přemek, studenti z techniky, kteří mi tu pomáhají třídít časopisy, knihy...

*Pan Ŝustr zalistoval v objemném svazku. I bez znalosti esperanta jsem poznala Dantovu Božskou komedii.*

Mám největší knihovnu esperantské literatury v ČSSR. Víte už, že je to můj koníček od mládí. Moc rád si v těch knížkách znovu a znovu čtu. Podívejte se, tady mám Křest sv. Vladimíra tištěný na Kanárských ostrovech, Krále Leara z Tokia, Hladový kámen od Thákura ze Švédska. Naši Babičku si přeložili z esperanta v Japonsku, Fučíkovu Reportáž na oprátce v Číně...

Rozmlouvala: Hana Čiháková

*Mladá fronta 4. 8. 1966*

**Ŝustr 25 jarojn prezidas la klubon!**

Eli Urbanová

Iam vi ŝajnis al mi stranga  
Pardonon, nome eĉ tre granda.  
Kial vi tiel multe kreskis?  
Iam vi por mi fremda estis,  
jes, vi, sinjoro prezidanto,  
simile kiel Esperanto.

Nun mian fronton kovrus nubo,  
se vi nur mankus en la klubo,  
se vi malsanus – ne, neeble!  
Mi vin bezonas tie nepre!  
Vi, hom' unika... en konvinko.  
Min same gajnis nia lingvo.

(1956)

**Jaroslavu Ŝustrovi (k 65. narozeninám)**

Tomáš Pumpr

Postkurante procesion  
mi balbutas ankaŭ ion:  
Nu, sesdek kvin –  
ĉu estas multe?  
Kiel stulte mi ĝenas Vin!  
Ne la vico  
de la jaroj  
sed la spico  
sub la haroj  
gravas!  
Kaj tiun Vi havas  
eĉ kun dozo da elano.  
Do ne manku ankaŭ sano!  
Tio estas la vivsenco.  
Jen la mano  
kun profunda riverenco.

(1966)

## Nigra elefanto

Jaroslav Ŝustr



En la centro de la Malnova Urbo de Prago, en domo nomata „Nigra Elefanto“, troviĝas la biblioteko kaj studejo de la Esperantista Klubo en Prago. La malnova domo havas ĉirkaŭaĵon tiom antikvan, historian kaj

pentrandan, ke vi vane serĉus similan en la tuta urbo.

Vane vi serĉus ankaŭ bildon de la elefanto, laŭ kiu la domo estas nomata. Dum la aliaj domoj konservis el la mezepoko sur siaj fasadoj bildojn aŭ skulptaĵojn, laŭ kiuj ili estas nomataj (ekz.: Ora Lilio, Blanka Kandeloo, Fera Pordo, Ruĝa Aglo aŭ En la Ĉielo), la domo „Nigra Elefanto“ ne plu havas sian signon jam de longaj jardekoj. Malnova, laŭaspekte kaduka, la domo formas angulon de la Strato Týnská kaj Strateto Týnská: sed ĝia ĉirkaŭaĵo estas tiom pentrinda kaj pitoreska, ke vere nur escepte vi ne renkontos ĉi tie pentriston aŭ fotografemulon, kiuj volas forporti tiun kuriozan lokon hejmen – almenaŭ sur bildo aŭ bildeto.

Preteriranto ne povas ĉi tie ne halti. Kaj halti, tio jam signifas ĉirkaŭrigardi kaj per la okuloj karesi la restaĵojn de la malnovaj tempoj.

Haltu ankaŭ vi, kara leganto! Rigardu ĉirkaŭen kaj viaj pensoj vin fluge portos en la pasintecon. Foliumu kun mi en la historio de ĉi tiu loko. Ĝi estas kvazaŭ neelĉerpebla puto de historiaĵoj kaj legendoj. Antaŭ viaj okuloj aperados en paradoksa miksaĵo multaj historiaj scenoj de ĉiuj jarcentoj per la naŭa komencante, ĝis la hodiaŭo! Elstaraj personoj de diversaj epokoj preterpasos kaj vi ree travivos kuriozajn eventojn, kiuj ĉi tie okazis. Vi admiros la malnovajn ŝtonajn dokumentojn, kies aĝoj nombras 500 ĝis 800 eĉ 1100 jarojn.

Se la ĉirkaŭaĵo de la biblioteko de la Esperantista Klubo en Prago vin interesas, haltu! La tempo ankaŭ haltos, sed nur por momento, kaj jam ĝi ruliĝas returnen. Spiro de la mezepoko vin ĉirkaŭos, blovo de pasintaj jarcentoj vin mirigos... preteriros staturoj, pri kiuj mi povus al vi multon diri kaj rakonti: Jen Karolo la IV-a, reĝo nia karmemora – tie la famaj komponistoj: italo Tartini, virtuozo je violono, kun Padre Boemo Ĉernohorský, gvardiano de proksima monaĥejo. Ĉeĥa nobelo Václav Budovec z Budova, Ibraĥim ben Jakub, la araba komercisto, la ŝtatprezidento Klement Gottwald, Karolo Ŝkréta, la ĉeĥa pentristo de baroko, imperiestro Rudolfo la II-a kun sia kortego, Václav Čabelický de Soutice. Matěj Rejsek – la arkitekturo, sinjoro Berka de Dubá, reĝo



Georgo de Poděbrady, ĉefepiskopo Jan Rokycana. Jan Jesenius, la fama kuracisto, la danoj Rozenkranc, Lange, Tycho de Brahe kaj aliaj. Gildo de ŝuistoj, gildo de pentristoj, la preĝejo de Dipatrino kaj la domoj kun nomoj: Ŝtona Tablo, Blanka Sonorilo, Lernejo de Rejsek, Nigra Cervo, Ora Ringo, Ungeld. Domo ĉe la Turkoj, palaco Granovski kaj multaj aliaj. Historio, rakontoj kaj legendoj abundas, kaj kompreneble – ankaŭ la fantomoj. En loko vere mirinda troviĝas la biblioteko de la Esperantista Klubo en Prago. Ni revenos ĉi tien en venontaj numeroj de nia Bulteno, se ili aperos!

*Bulteno de EKP, n-ro 57/1960*

En la pasinta numero de nia Bulteno mi invitis nian karan legantaron halti en strato Týnská, en la proksimeco al nia biblioteko, kaj foliumi kun mi en la historio de ĉi tiu antikva loko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ne estis hazardo, ke la nomo de la ĉeĥa reĝo Karolo la IV-a venis al nia menso unualoke. La strateto Týnská estas tre mallarĝa. Certe pli mallarĝa, ol ĝia samnoma strateto, kiu ĝuste ĉe nia domo debranĉigas direkte al la strato Dlouhá. Nian bibliotekon oni eniras rekte el la strato. Se vi volas en tiu loko transiri nian straton por veni al ĝia kontraŭa flanko, vi povas fari nur kvin paŝojn. Nur kvin normalajn, ne tro longajn paŝojn. Ĉe la sesa vi jam kunpuŝiĝus kun unu el la fortikaj pilastroj, kiuj apogas la murojn de gotikstila preĝejo de Dipatrino antaŭ Týn ... kaj tiamaniere ni venis al tiu karmemora ĉeĥa reĝo Karolo la kvara. Li estis ja fondinto de ĉi tiu granda, impona sanktejo, estis li, kiu ordonis konstrui ĝin ĉi tie en la lastaj jardekoj de sia vivo. Karolo kutimis inspektadi la konstrulaborojn. Ho, kiom da tempo pasis jam de tiuj okazintaĵoj el la 14-a jarcento! La reĝo observadis la konstruadon de ĉiuj flankoj kaj de sur ĉirkaŭaj ŝtonaj domoj. Eble li staris ĝuste en la domo, sur kies originaj romanikaj fundamentoj staras la „Nigra Elefanto“. Sed ĝi havis tiutempe alian nomon. Ĝi estis nomata domo „Ĉe Ĉielarko“. Tiu domo, konstruita el blankaj ŝtonoj, estis tiam, en la tempo de parolo, jam tre malnova! Eble la teretaĝo de tiu parto, en kiu situas nia biblioteko, devenas ankoraŭ el tiu epoko, ĉar ĝian plafonon portas ogivaj ripoj de pura, gotika stilo. Karolo ne finkonstruis la preĝejon. La konstruado estis interrompita dum husanaj militoj, kaj nur post proksimume 100 jaroj estis finita. Ni staras en la ombro de ĝiaj majestaj turoj. Unuavide ili ŝajnas esti samaspektaj. Sed se vi atente ilin komparas, vi konstatos diferencojn similajn al tiuj, kiujn vi vidas ĉe Sankta Georgo kaj ĉe multaj aliaj duturaj preĝejoj mezepokaj: Dum „Adamo“, la maldekstra turo, estas svelta, gracitalia, ĝia kunulo, aŭ kunulino „Evo“, do la turo dekstra, estas pli dika, pli korpulenta. Precize laŭ mezepokaj kutimo kaj ideo pri la inaj belformoj! La epoko de gotika stilo kun maldikaj asketaj formoj, tamen preferis proporciojn pli plenajn, pli sukhavajn ĉe virina korpo. Tiu tura paro antaŭ

nia biblioteko multe superstaras la altan preĝejon kaj ĉirkaŭajn domojn. Jam kvin jarcentojn tiuj turoj rigardas al la Malnovurba Placo.

Ili estas unu el la multaj ĝiaj ĉefaj vidindaĵoj. Kiom da scenoj, historiaj okazintaĵoj kaj eventoj ili ĉi tie vidis. Kiom da festoj, solenoj, dolorplenaj masakroj, humiligo de nia popolo, kaj ĉiam novaj levigoj al la pli granda kaj pli feliĉa estonteco. Sed ni revenu al la fondinto de la preĝejo. Kiom da tiaj konstruveloj restis al ni el la tempo de lia regado... multaj preĝejoj, kasteloj, la katedralo, la ŝtona ponto... Ĉu vi iam pensis pri tio, ke Karolo estis kreinto de panoramo, kiun ĉiuj ĉeĥoj tiel ŝatas? Rigardu nur la panoramon de Prago. Certe vi havas ĝian bildon hejme sur la muro, malgraŭ, ke vi povas vidi ĝin ĉiutage en la originalo. Kio faras la panoramon de Prago plej bela? Supre la majestata katedralo, kaj malsupre la ponto de Karolo eminentaj verkoj de arkitektoj Petro Parlěř kaj Mateo de Arras, kiujn venigis ĉi tien Karolo mem.

Ernesto de Pardubice, la ĉefepiskopo, certe celebrus meson memore al Johano Lucemburga – la patro de Karolo. Estas hodiaŭ la tago de sankta Rufo – la 26-a de aŭgusto. En la jaro 1346 pereis tiutage apud Crécy en Flandroj lia patro Johano, helpante en la batalo al sia parenco, la franca reĝo Filipo, kontraŭ angla Eduardo. – Tiuj tri plumoj de vulturo, kiujn havas la angla reĝa familio en ĝia blazono, devenas de ĉi tiu malfeliĉa okazintaĵo. Estas tiuj tri plumoj vulturaj, kiujn sur sia kasko portis la blinda ĉeĥa reĝo Johano.

Vivis en Prago samideano, kies vizaĝo treege similis al la vizaĝo de reĝo Karolo la IV-a, kiun ni konas el multaj bildoj de Karola epoko. Estas mirinda afero. Dum la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago (1921) ni prezentis teatraĵon – „Nokto en Karlštejn“ de Jaroslav Vrchlický, en la traduko de nia membro profesoro Miloš Lukáš. Rolon de reĝo Karolo ludis samideano Bunzel. Estis li, kies vizaĝo tiom similis al vizaĝo de Karolo. Lin maskisto ne devis ŝminki! Ĉu vivas ankoraŭ tiu samideano?

*Bulteno de EKP, n-ro 58/1960*

Ni daŭrigu hodiaŭ denove nian promenadon tra la ĉirkaŭaĵo de „Nigra Elefanto“. Ni eliru el la Biblioteko de Esperantista Klubo en Prago, kiu troviĝas en la strato Týnská n-ro 3, kaj turnu nin maldekstren! De la paŝado ni certe ne laciĝos, ĉar jam post 15-20 paŝoj haltigos nin rava bildo, kiu malfermiĝis antaŭ ni: La domoj, pitoreske grupigitaj, formas miniaturan placeton vere vidindan. Ĉi tie nia strato fendiĝas en tri direktojn: Akre ĝi turniĝas dekstren, ĉirkaŭante la gotikstilan preĝejon de Dipatrino, por veni al la stratoj Štupartská kaj Celetná. Rekten ĝi daŭrigas sian vojjon, ŝovante sin tra la trairejo de antikva palaco. Estas palaco Granovski, sub kies volbaĵo la strato ricevas la nomon „Týn“ aŭ „Týnský dvůr“ (kortego de Týn). Fine la plej maldekstra branĉo de nia strato subiras malnovan domon

kaj rapidas al la strato Masná. Kiel stranga estas tiu domo, tra kiu nia strato iras. Ĉe sia dekstra flanko en la teretaĝo ĝi tute ne havas muron! Kaj tamen ĝi staras solide: Ĝi apogas sin je „Ora Ringo“. „Ora Ringo“ estas nomo de la domo najbara. Kaj ĉiuj ĉi domoj, la „Nigra Cervo“, la domo de Václav Budovec z Budova, la „Ora Ringo“, la palaco Granovski kaj „Ungeld“, formas tiel pitoreskan scenejon, ke lerta reĝisoro ne povus elpensi pli kuriozan, por prezenti scenon el mezepoka urbo. Ni ne povas satiĝi je tiu ĉi bildo. Somere kiel vintre, printempe kiel aŭtune, ĉiutage vi povas trovi ĉi tie artistojn, kiuj en sian skizlibron, aŭ sur tolon eternigas tiun antikvan belajon. La samon faras turistoj kaj hazardaj vizitantoj, sed tiuj estas pli rapidaj. Per siaj kameroj ili kapablas multe pli rapide fari ne unu, sed multajn bildojn.

Tiu branĉo de nia strato, kiu iras rekten, trairas la palacon Granovski, kaj venigas nin al placo iom pli vasta ol la antaŭa. Ĝi troviĝas en „Týn“. Tiu antikva ĉeha nomo signifas „loko fortikigita“. <sup>17</sup> Tia ĝi vere estis. Jam antaŭ multaj jarcentoj ekzistis ĉi tie fortikigita foirejo kaj vardeponejo por eksterlandaj komercistoj, kiuj post pago de imposto ekspoziciis ĉi tie siajn riĉaĵojn por vendi au ŝanĝi ilin je varo alia. Ĉi tiu loko funkciis do kiel internacia komercejo aŭ foirejo jam en la komenca historio de Prago. Prago tiam kuŝis sur la krucvojo inter nordo kaj sudo, okcidento kaj oriento, kaj la trafiko estis ĉi tie sufiĉe granda. La foirejo estis ĉirkaŭita per fortikaj muroj, konstruitaj el dikaj traboj. Sed poste, la ŝtono kiel konstrumaterialo ĉiam pli kaj pli uzata, anstataŭigis lignajn barojn. Kelkaj restaĵoj de ili estas ankoraŭ nun bone konstateblaj, kun siaj tipaj mallarĝaj romanikaj fenestretoj. Tiuj muroj ekestis antaŭ mil aŭ 1100 jaroj. Eble eĉ pli frue, ĉar jam en la naŭa kaj deka jarcentoj staris ĉi tie domoj konstruitaj el ŝtono. Bonkvalita ŝtono estis minata ĉe okcidenta limo de la urbo en granda kvanto, kaj tial ĉiu sopiris havi domon ŝtonan, domon, kiu ne forbrulas, kaj estas pli daŭra ol domo ligna. Dokumentojn pri tio ni povas ĉi tie en la ĉirkaŭaĵo ĉie vidi. Nia domo, la „Nigra Elefanto“, estas nenia escepto inter ili. Sufiĉas iri malsupren en la kelon de kiu ajn el la malnovaj domoj. Ĉie ni trovas romanikajn restaĵojn de la domoj, kiuj samloke staris antaŭ la domoj nunaj, jam antaŭ multaj jarcentoj. Tio estas dokumentoj el ŝtono! Sed ekzistas ankaŭ kelkaj dokumentoj sur pergameno skribitaj, kiuj parolas pri longega kaj malnova historio de ĉi tiu loko! Ni citu nur du: En la kapitula biblioteko estas konservata dekreto de la ĉeha reĝo Venceslao la Dua. En ĝi, la 24-an de aŭgusto 1298 ĉi tiu reĝo deklaras la foirkorton „Týn“ en Malnova Urbo de Prago liberigita de ĉiuj impostoj kaj ŝarĝoj. – Alia dokumento ne estas en nia lando. Ĝi ankaŭ ne devenas de ĉeha fonto.

---

<sup>17</sup> La vorto „týn“ devenas etimologie de samsignifa kelta vorto „dun“, kun kiu estas parenca ankaŭ la hodiaŭa angla „town“. Ĝi estas lingva memoraĵo pri keltaj gentoj, kiuj en la jarcentoj antaŭ Kristo, loksidis en niaj landoj.

Ĝi estas multe pli aĝa, skribita antaŭ plena jarmilo. Ĝia aŭtoro estas araba hebreo Ibrahim ibn Jakub, kiu, en la deka jarcento dum siaj vojaĝoj tra multaj eŭropaj landoj vizitis Pragon, pri kiu li skribas, ke ĝi estas urbo, konstruita el ŝtono! Verŝajne li estis komercisto; li certe tiam ekloĝis ie proksime de loko, kie nun ni havas nian bibliotekon. Ĉi tie ja staris la plej multaj domoj konstruitaj el tiu blanka marmorŝtono de Břevnov aŭ Bílá Hora. En la fundamentoj, kaj en la keloj de ĉirkaŭaj domoj, ĉie ni trovas ĝin. La centro de la vivo, la arterio de la komerco en Prago antaŭ jarmilo pulsas ĉi tie. Ĉi tie certe Ibrahim ibn Jakub ĉerpis plejmulton el tiuj scioj pri Prago kaj pri la slavaj landoj, pri kiuj li skribis en sia raporto, kiu hodiaŭ estas la plej malnova skriba dokumento pri la ekzisto de Prago (kiel urbo konstruita el ŝtono kaj kalko)...

Malantaŭ nia dorso postrigardas nin malbela „Nigra Elefanto“. La pordo de nia biblioteko estas malfermita. Ni eniru, por tralegi tie parton de tio, kion Ibrahim ibn Jakub skribis antaŭ plena jarmilo, kaj kion en siaj tradukoj kaj verkoj konservis por nia nacio Ed. Kowalskij, J. Hrbek kaj aliaj.

*Bulteno de EKP, n-ro 60/1961*

Ne estas mia kulpo, ke dum la „ekskurso“, kiun ni entreprenis el nia biblioteko en la pasinta numero de nia Bulteno, ni ne faris pli ol eble 50-60 paŝojn. La ĉirkaŭaĵo observata el la loko, kiun ni ĝisiris, donis al ni tiel abundan historian materialon, ke ni povus pri ĝi mediti, paroli kaj diskuti dum longaj horoj. La senpera proksimaĵo de Týn, kiu jam en la naŭa kaj deka jarcentoj servis al komercado, transportis nin en tiun antaŭmiljaran tempon. Vigla trafiko regis ĉi tie. Ĉi tien venadis komercistoj el oriento kaj okcidento, el nordo kaj sudo por vendi aŭ interŝanĝi siajn varojn. Ili pagis doganon el siaj varoj, kiujn ili povis ĉi tie deponi. Kaj ili ĝuis protekton, ĉar Týn estis fortikigita kaj havis gardistojn. Inter la fremduloj, kiuj ĉi tiun lokon en la deka jarcento vizitis kaj ĉi tie konatiĝis kun Prago, estis ankaŭ araba hebreo Ibrahim Ibn Jakub, komercisto, kiu postlasis la plej malnovan skriban dokumenton pri Prago kiel urbo. Ibrahim Ibn Jakub arabe priskribis siajn vojaĝojn tra kelkaj eŭropaj landoj. Tiam, antaŭ mil jaroj, oni ne multe zorgis pri tiaj verkoj, sed estis bona kutimo konservi ilin en la biblioteko. Feliĉe ankaŭ ĉi tiu verko estis retrovita post pli ol 900 jaroj ie en Turkujo. El la araba lingvo tradukis ĝin pola sciencisto Ed. Kowalski, kies laboron poste uzis I. Hrbek, por transdoni ĝin ankaŭ al la ĉeĥa nacio.

Ibrahim Ibn Jakub ekzemple skribas:

(Inter krampoj troviĝas komentoj al la originala teksto) „La slavaj landoj etendiĝas ek de Sirta Maro (Maro Mediteranea) ĝis oceano en la norda direkto (Balta Maro). Iuj gentoj de nordo perforte okupis iliajn landojn kaj restadas inter ili. Inter la slavoj estas multaj diferencaj triboj. Iam, en la pasintaj tempoj, ili estis unuigitaj sub unu reĝo, kies titolo estis Máĥa. (Ĉi

tiun titolon oni ne sukcesis ĝis nun klarigi.) Tiu reĝo devenis el gento nomata Velitábá. (Sendube temas pri kripligita araba transskribo de nomo Velináná – Volinanoj.) Ĉi tiu gento estas de ili tre ŝatata kaj respektata. Poste ili malpaciĝis inter si, kaj tiel malaperis ilia antaŭa unueco. La gentoj poste formis diversajn grupojn. Super ĉiu gento regas ilia reĝo. Nun ili havas kvar reĝojn: reĝon de Bulgaroj, reĝon Bujislav (Boleslav II, 967–999), reganton en Prago (en la originalo ni legas Frágá), Bohemio kaj Krakovo. Plie ili havas reĝon Meŝko (pola Mieszko I, 960-992) reganton de la nordo, kaj reĝo Nakún en la plej norda parto estas princo de Obodritoj (954-96?)“.

Pri la ĉeĥoj, Bohemio kaj Prago parolas Ibrahim jene:

„Koncerne la landon de Boleslav: Ĝia longeco, de la urbo Prago ĝis Krakovo, egalas al vojo de tri semajnoj kaj najbaras kun lando de la turkoj (hungaroj). La urbo Prago estas konstruita el ŝtono kaj kalko kaj estas la plej granda urbo de komerco. Venas ĉi tien el la urbo Krakovo rusoj kaj slavoĵ kun la varo, kaj el landoj de turkoj venas muzulmanoj, hebreoj kaj turkoj (hungaroj) ankaŭ kun varoj kaj komerca nomo. Ili eksportas de ĉi tie sklavojn (aŭ farunon? – la malnova araba lingvo uzas por tiuj du malsamaj ideoj nur unu esprimon), stanon kaj diversajn felojn. Ilia lando estas la plej bona lando de nordo kaj plej bone provizita per nutraĵo. Por unu kirato (0,212 gr) oni aĉetas tiom da tritiko, ke ĝi sufiĉas al homo por tuta monato. Kaj por la sama prezo oni vendas tiom da hordeo, kiom sufiĉas al rajdanto por kvardek tagoj, kaj krome por tiu kirato dek kokinojn. En la urbo Prago oni fabrikas selojn, bridojn, kiaj estas en ĉi tiuj landoj uzataj. En la lando de Boleslav estas fabrikataj ankaŭ delikataj tuketoj el maldika teksaĵo, simila al reto, kiuj servas por nenio. La valoro de ili estas jena: dek tuketoj por unu kirato. Tiujn tuketojn oni uzas ĉe la komercado por pagi per ili. La tuketoj formas ilian havaĵon kaj valoron de ĉiuj objektoj. Por la tuketoj oni akiras tritikon aŭ farunon, ĉevalojn, oron, arĝenton kaj ĉion ceteran. Nekutima afero estas, ke la civitanoj de l’ lando de Boleslav estas brunetaj kaj nigraharaj, dume tipoj blondaj estas inter ili maloftaj.“

En aliaj partoj de sia verko Ibrahim Ibn Jakub parolas pri la slavoĵ ĝenerale:

„La slavoĵ entute estas kuraĝaj kaj heroaj. Kaj se ili ne estus dividitaj je multaj gentoj kaj apartaj grupoj, neniun nacio venkus ilin per sia forto. Ili loĝas landojn plej riĉajn en senco de fekundeco kaj plej bone provizitajn per nutraĵo. La slavoĵ sin diligente dediĉas al terkulturado kaj al fabrikado de objektoj bezonataj por la vivo, en kio ili superas ĉiujn popolojn de nordo. Iliaj varoj per seka kaj mara vojoj migras al Rusujo kaj al Konstantinopolo. En neniun el la nordaj landoj okazas malsato sekve de manko de pluvo aŭ longeco de seka vetero. Male, ĝi aperas pro abundo de pluvo kaj pro daŭra amasigo de akvo. Seka vetero ne estas ĉe ili pereiga,

ĉar neniu, kiu per ĝi estas trafita, timas ĝin, pro sufiĉa malsekeco de ilia lando kaj granda malvarmo. La semadon ili faras en du jarsezonoj, somere kaj printempe, kaj ili havas du rikoltojn.

La slavoj sin vestas per larĝaj vestoj, sole la manumoj de la manikoj estas mallarĝaj. En ilia lando vivas stranga birdo, verda surdorse, kiu ripetas ĉion, kion ĝi aŭdas de homoj kaj bestoj. En la slava lingvo ĝi nomiĝas sba. (Temas verŝajne pri sturno, ĉeĥe nomata špaček, pole szpak.) Krome vivas tie ankaŭ sovaĝa koko, kiu nomiĝas slave tetra (tetraego). Ĝi havas bongustan viandon kaj ĝian voĉon oni povas aŭdi en distanco de parasango (araba longunuo, mezuranta 5762 m). Ekzistas du specoj. Nigra kaj multkolora. Tiu estas pli bela ol pavo. La slavoj havas diversajn specojn de kord- kaj blovinstrumentoj. La longeco de unu el tiuj blovmuzikiloj estas pli ol du kubutojn. Korda instrumento havas ok kordojn kaj ĝia malsupra disko estas plata. Ilia trinkaĵo estas vino kaj mielo...“

Tiel kaj simile skribas pri nia lando kaj pri niaj antaŭuloj Ibrahim Ibn Jakub antaŭ plena jarmilo. Estas nerefutebla fakto, ke tio, kion li skribis, eĉ se temas nur pri priskribo mallonga, bonege dokumentas, ke Prago en tiu tempo estis jam urbo granda, riĉa kaj vivoplena. Ibrahim Ibn Jakub trairis multajn urbojn de Eŭropo. Li do certe povis kompari siajn impresojn el Prago kun tiuj, kiujn li havis pri aliaj grandaj urboj de okcidento kaj sudo.

*Bulteno de EKP, n-ro 61/1962*

La domo, nomata „Nigra elefanto“, staras jam longajn jarcentojn. Dum tiu tempo venis en ĝian proksimecon nemalmultaj historiaj personoj. En la postsignoj de kelkaj ni iris en la antaŭaj kvar ĉapitretoj de mia rakontado. Lastfoje ni atentis vizitanton, kiu estis ĉi tie antaŭ plena jarmilo. Nun ni saltu trans ses jarcentojn kaj ekskursu en la komencon de la deksepa jarcento. Ni ree eliru el la biblioteko de la Esperantista klubo ĉe „Nigra elefanto“. Ni vizitu tombon de eminentulo, kiu dum sia nelonga restado en Prago la Nigran elefanton verŝajne neniam preteriris. Lin oni alportis ĉi tien nur post lia morto, por entombigi lin en la preĝejo de Virgulino Maria en Týn. Estis dana astronomo Tycho Brahe.

Ok aŭ dek paŝojn ni bezonas por esti jam ĉe la muro de tiu granda preĝejo. Post pliaj eble 20 paŝoj ni staras antaŭ la flanka enirejo, por ke en sekva momento ni troviĝu sub ogiva volbaĵo de la sanktejo. La tombon de Tycho Brahe ni trovos tre facile. Ĝi situas en loko tre honora, en ĉefa navo, proksime al la ĉefaltaro. Dana flageto, kiun postlasis ĉi tie iu el okazaj danaj vizitintoj, plifaciligos al ni la serĉadon. Novtempa nigra tomboŝtono kovras la kripton. Malnova ĝia antaŭulo el ruĝa marmoro staras kiel monumento apude.

Ĉi tie do ripozas granda sciencisto de sia epoko Tycho Brahe. Favorato de ĉeĥa reĝo kaj imperiestro Rudolfo II-a, fama astronomo, eminenta

matematikisto, scienca verkisto, inventisto kaj fondinto de praktika astronomio, persona amiko de Kepler, homo, kiu dum sia vivo spertis malfeliĉojn, persekutojn kaj malfavorojn sennombrajn. Elpelite el sia patrujo li sekvis inviton de granda amiko de sciencoj kaj artoj – la ĉeĥa reĝo Rudolfo II-a, kaj vivis ĉe lia kortego en Prago. Siajn astronomiajn observojn li faris grandparte en la kasteleto de Benátky nad Jizerou, kie ankoraŭ hodiaŭ simile kiel en Prago, troviĝas kelkaj el liaj astronomiaj instrumentoj, kiujn laŭ liaj inventaj desegnoj kaj konsiloj konstruis por li ĉeĥaj metiistoj. Post sia tragedia morto en jaro 1601, laŭ la deziro de reĝo li estis ĉi tie entombigita la 25-an de oktobro 1601. Amasego da popolo, eminentaj sciencistoj kaj artistoj, tuta reĝa kortego kaj la reĝo mem ĉeestis. Elstaraj personecoj el rondoj sciencaj parolis super la ĉerko.

Pasis 300 jaroj. Estis jaro 1901. En Prago okazis granda kongreso de astronomoj kaj matematikistoj. La kongresanoj venis por honorigi la memoron de Tycho Brahe. Ne longe antaŭ tio, fama antropologo profesoro Matiegka esploris la kripton. Kvankam pasis tri jarcentoj de la morto, la restaĵoj de Tycho Brahe estis facile rekoneblaj laŭ difekto de la kranio, kiun Tycho dum malfeliĉa duelo foje suferis. Kun li ripozas en la kripto ankaŭ lia edzino Kristina.

Pasis ankoraŭ 50 jaroj. En la jaro 1951 okaze de 350-a datreveno de la morto de ĉi tiu astronomo rememoris pri li liaj samlandanoj-esperantistoj. Estas jam malnova nia kutimo ĉiun danan aŭ skandinavan esperantiston venigi al ĉi tiu tombo. Centra Dana Ligo Esperantista sekvante la deziron de siaj membroj, kiuj foje vizitis ĉi tiun lokon, sendis rubandon por ornami la tombon. Honora tasko de pragaj esperantistoj estis aldoni la florkronon. Ĉio okazis tre bone. Ne nur esperantistoj venis, sed ankaŭ multaj neesperantistoj. Super la tombo okazis paroloj en lingvoj ĉeĥa kaj Esperanto, granda florkrono kun verdaj rubandoj de CDEL estis metita sur la tombon. Solena ilumino de preĝeja interno donis al la ceremonio neatenditan brilon. Tutan tagon kaj tutan nokton du grandaj kandeloj brulis ĉe la kapo de tombo. La rubando kun kelkaj aliaj, kiujn alportis danaj esperantistoj, ankoraŭ hodiaŭ parolas pri Esperanto al ĉeĥaj kaj eksterlandaj turistoj, kiuj ĉiutage venas ĉi tien. El la familio Brahe neniu plu vivas. Antaŭ kelkaj jardekoj elmortis tiu gento. Sed en Prago oni rakontas, ke ĉi tie vivas lasta parenco de Tycho Brahe. Estas la librobindisto kaj preĝeja pedelo s-ro Davídek, kiu dum longaj jardekoj zorgas pri bona stato de multaj trezoroj de la preĝejo kaj pri bona stato de la tombo de Tycho Brahe unualoke.

*Bulteno de EKP, n-ro 62/1962*



**B U L T E N O**  
**de Esperantista Klubo en Prago**  
Časopis Klubu esperantistů v Praze  
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

**Klub esperantistů v Praze**

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7